

# La Libro de Mormon kiel Atesto de la Malnova Testamento

Glenn L. Pearson

Por iuj legantoj de la Biblio, la verkoj de diversaj kritikuloj eble dubigas la statuson de la Biblio kiel die inspiritan libron. Kiel, ili rezonas, povas oni akcepti la Bibliion kiel revelacion se kiel iuj kritikuloj asertas, ĝi ne diras la veron pri teologio (ekzemple, la naturo de Dio kaj la homo) kaj historio (la falo, la diluvo, la disiĝo de la kontinentoj, kaj la Eliro)? Kaj se tiuj aferoj ne estas veraj, kiom veraj estas la moralaj kaj etikaj leĝoj instruataj en la Biblio?

Rezulte ke, multaj hodiaŭaj kristanoj kredas en la Biblio nur en tiuj aspektoj, kiuj ne malakordas kun la ĝenerala opinio de la scienca komunumo aŭ la ĝeneralan moralan opinionon de la popolamasoj.

Feliĉe, la Libro de Mormon estas forta atesto, ke la Malnova Testamento estas vera. Ĝi elpruvas kaj klarigas multe de tio, kion enhavas la Nova kaj Malnova Testamentoj. En la lastaj adiaŭo kaj atesto de Mormon, li diris al la Lamanidoj, ke la Libro de Mormon estis verkita por ke ili kredu la Bibliion. La evangelio, li diris, estos skribita en "ĉi tiu historio" (La Libro de Mormon), kaj "ankaŭ en la historio, kiu alvenos al la nejudoj el la Judoj." (Biblio). Kaj, li daŭras, "ĉi tiu (la Nifaiida historio) estis verkita cele, ke vi kredu tiun (la hebrea historio); kaj se vi kredas tiun, vi ankaŭ kredos ĉi tiun." (Mormon 7:8-9)

Ni ekzameni iujn defendojn de la Biblio, kiuj troviĝas en la Libro de Mormon.

## La Dieco de Kristo

La tuta Libro de Mormon estas atesto pri la dieco de Jesuo Kristo. Laŭ la vortoj de luterana pastro, kiu konvinkiĝis pri ĝia vereco, "Ĝi estas la plej kristoamanta libro, kion mi iam ajn legis. Enestas ne unu vorto, kiu gvidas iun ajn for de Kristo aŭ al malbono."

Unu el la celoj de la Libro de Mormon, kiel asertas la titolpaĝo, estas konvinki "kaj la Judon kaj la nejudon, ke Jesuo estas la Kristo." Kiam la Libro de Mormon eldoniĝis, la plimulto de kristanoj kredis, ke Jesuo estas la Kristo, eĉ se tion ili ne komprenis. Sed, lastatempe, multaj kristanoj ne kredas, ke li estas la dia filo de Dio. Nur nia Ĉiela Patro kapablas scii, ke tia turniĝo okazos, kaj ke la Libro de Mormon estos grava atesto pri sia Filo.

La verkistoj de la Malnova Testamento adoris la Eternulon (Jehovo), kaj sciis, ke Jesuo estos la Savanto. (Vidu Jesaja 43:11; 45:15, 21; 49:26; 60:16; Hoŝea 13:4.) La Libro de Mormon validigas tiun fakton: "Ke mi pli komplete persvadu (miajn fratojn) kredi en la Eternulo, ilia "Elaĉetanto," diris Nifai, "Mi ja legis al ili tion, kion skribis la profeto Jesaja." (1 Nifai 19:23)

Pli malfrua profeto, ankaŭ nomita Nifai, deklaris ke la profetoj de la Malnova Testamento

ankaŭ atestis pri Kristo: "Moseo ne nur atestis pri ĉi tiuj aferoj, sen ankaŭ ĉiuj sanktaj profetoj, ekde siaj tagoj eĉ ĝis la tagoj de Abraham.

"Ja, kaj jen, Abraham vidis lian alvenon kaj pleniĝis de ĝojo kaj ĝojis. Ja, kaj jen, mi diras al vi, ke ne nur Abraham sciis pri ĉi tiuj aferoj, sed estis multaj, kiuj antaŭ la tagoj de Abraham estis alvokataj laŭ la maniero de Dio: ja, eĉ laŭ la maniero de la Filo; kaj ĉi tio, por montri al la popolo, plurajn jarmilojn antaŭ lia alveno, ke eĉ la elaĉeto alvenos al ili." (Hilaman 8:16-18)

### La Celo de la Leĝo de Moseo

Alia kialo pro la alveno de la Libro de Mormon, laŭ ĝia titolpaĝo, estas instrui la Judojn "la interkonsentojn de la Eternulo." La vera signifo de la Leĝo de Moseo kaj de la interkonsentoj realigitaj kun Izraelo ne troviĝas en ceremonioj: bankedoj kaj festoj - minimume, oni havu la komprenon pri la celo de ĉi tiuj funkcioj. Profetoj de la Libro de Mormon klarigas la veran signifon de la Leĝo de Moseo kaj la interkonsentojn, kiujn la Eternulo realigis kun Abraham, Isaak kaj Jakob.

Laŭ la Libro de Mormon, la fidelaj posteuloj de Lehi, kiuj vivis antaŭ Kristo komprenis, ke la Leĝo de Moseo celas Kriston kaj ilian sinoferon:

"Ili obeis la Leĝon de Moseo; ĉar estis necese, ke ili gardu la Leĝon de Moseo ankoraŭ, ĉar ne ĉio plenumiĝis. Tamen spite al la Leĝo de Moseo, ili anticipis la alvenon de Kristo, konsiderante, ke la Leĝo de Moseo estas tipo de lia alveno, kaj kredante, ke ili gardu tiujn eksterajn ritojn ĝis la tempo, ke li sin malkaŝos al ili.

"Nun, ili ne supozas, ke la savo alvenas per la Leĝo de Moseo; sed la Leĝo de Moseo ilin servis por fortigi ilian fidon en Kristo; kaj tiel ili retenis esperon per fido pri eterna savo, dependante de la spirito de profetaĵo, kiu parolas pri tio, kio alvenos." (Alma 25:15-16)

"Jen, ĉi tio estas la tuta signifo de la leĝo, ĉiu peco celas al tiu granda kaj lasta oferaĵo; kaj tiu granda kaj lasta oferaĵo estas la Filo de Dio, ja ĉiam kaj eterne." (Alma 34:14)

Post la konvertiĝo de Paŭlo, li dolorege konsciiĝis pri tio, ke li ne komprenis la Malnovan Testamenton. Kiel la plimulto de Judoj de la epoko, li vidis "preter la marko." (Jakob 4:14). Anstataŭ uzi leĝojn kaj ritojn kiel ilojn por trovi Kriston, ili serĉis preter Kristo kaj emfazis la eksterajn leĝojn kaj ritojn.

Paŭlo deklaris, ke Izraelo estis malbenata de la Eternulo per blindeco de spirito kaj, ke tio daŭros ĝis kiam la tempo de la "pleneco de la nacioj (nejudoj) alvenos." (Romanoj 11:25). Li citis la profeton Jesaja, komparante tion, kun la judoj de sia tago: "Ĉar la koro de ĉi tiu popolo grasiĝis, kaj iliaj oreloj aŭdas malklare, kaj siajn okulojn ili fermis, por ke ili ne vido per siaj okuloj, kaj por ke ili ne aŭdu per siaj oreloj, kaj por ke ili ne komprenu per sia koro, kaj por ke ili ne konvertiĝu, kaj por ke Mi ne sanigu ilin. (Agoj 28:27)

Kiam Paŭlo estis sub domaresto, atendante sian prijuĝon, li petis, ke la elstaraj judoj de la urbo lin vizitu. Kiam ili alvenis, li "faris al ili klarigon, atestante la regnon de Dio, kaj penante konvinki ilin pri Jesuo, el la leĝo de Moseo kaj el la profetoj, de mateno ĝis vespero." (Agoj 28:23)

Paŭlo tiele indikis sian komprenon, ke se oni ne vidas Jesuon ĉie en la Malnova Testamento, oni ne kapablas kompreni la Malnovan Testamenton.

La Libro de Mormon povas servi kiel "grandioza malfermanto de okuloj" kaj oreloj de la Eternulo cele al kompreno de la Malnova Testamento. Kaj ĉu tion ne diris Jesaja en sia granda profetaĵo pri la apero de la Libro de Mormon? Post sia rakonto pri la sigelita libro kaj ĝia mirinda traduko, li diris "Kaj en tiu tago la surduloj aŭdos la vortojn de la libro, kaj la okuloj de la blinduloj ekvidos tra mallumo kaj nokto. Kaj la mizeruloj havos grandan ĝojon en la Eternulo, kaj la homoj malriĉaj triumfos en la Sanktulo de Izrael." (Jesaja 29:18-29)

Mitoj, Mirakloj kaj Kataklistoj

La terio de biologia evoluo faris, ke multe da personoj kredas je socia evoluo ankaŭ. Iuj bibliaj ekspertoj antaŭenigas ĉi tiun ideon, dirante, ke tiu parto de la socia evoluo estis evoluo de religio ekde fruaj konceptoj ĝis modernaj. Ekzemple, la ideo de iu Dio en formo de homo (antropomorfismo) estas konsiderata primitiva. Pli saĝa koncepto pri Dio, ili rezonas, lin faras spirita dio mankiganta substancon kaj pleniganta la vastecon de spaco. Iuj kritikuloj dubigas la librojn de Moseo dirante, ke ili estas kompiloj da mitoj de primitivaj popoloj.

La Libro de Mormon estas forta atesto pri la historia realeco de multaj eventoj menciitaj en la libroj de Moseo. Ekzemple, estas klare per la verkoj de la profetoj de la Libro de Mormon, ke Adam kaj Eva estis fakte niaj unuaj gepatroj. Ankaŭ estas klara, ke ili ne havis primitivan religion - ili ricevis kaj komprenis la evangelion de Jesuo Kristo. (Vidu 2 Nifai 2:19-26)

Dum iuj kritikuloj pridubas la universalan rezulton de la Falo, la Libro de Mormon asertas, ke "Se Adam ne estus malobeinta, li ne estus falinta, sed li estus restinta en la ĝardeno de Eden. Kaj ĉiuj kreitaĵoj devintus resti en la sama stato en kiu ili estis post la kreo; kaj ili estus restintaj por ĉiam kaj ne estus havinta finon." (2 Nifai 2:22)

Alia ekzemplo de biblia rakonto ĝenerale konsiderata mito estas la priskribo de la lingvokonfuzo ĉe la Turo de Babel. La rakonto pri la Jaredidoj en la Libro de Mormon, tamen elpruvas la version en Genezo (Vidu Iter 1:3,33; Omnai 1:22)

Kiel indikite en la titolpaĝo de la Libro de Mormon, unu el la roloj de la Nifaiida kroniko estas montri al la Izraelidoj "kiom grandajn verkojn Dio faris por iliaj prapatroj." Multaj modernaj personoj ne kredas je la mirakloj de la Eliro laŭlitere. Profetoj de la Libro de Mormon alimaniere, atestas pri ili.

En la Libro de Mormon, ni lernas, ke la akvoj de la Ruĝa Maro verdire disfendiĝis, "kaj la izraelido transiris sur seka tero." (1 Nifai 4:2). Kaj Nifai donis al siaj fratoj longan priskribon pri multaj aliaj mirakloj, kiujn Dio faris por Moseo kaj la Izraelidoj, atestante pri ilia realeco. (Vidu 1 Nifai 17:24-42).

Unu el la pli nekutimaj rakontoj en la Biblio estas tiu pri la ordono de Josuo, kiam li ordonis, ke la suno ne malsupreniru. (Vidu Josuo 10:12-14). La ĉirkaŭteksto de la rakonto - evidente redaktora komento de Mormon - klarigas, ke la verkisto ne fiuzas simplajn superstiĉojn, kiujn la Nifaiidoj alportis el la malnova mondo. Krom tio, la verkisto rakontas miraklojn kaj fizikajn fenomenojn por ilustri la potencon de Dio. Li priskribas kosmon en kiun Dio intervenas kaj aktive partoprenas por plenumi liajn celojn; valoj fariĝas montoj kaj montoj fariĝas valoj. La homoj estas afliktitaj per malsato, pesto kaj morto. Eĉ la tero skuiĝis kaj eliras sian orbiton.

Mormon ne rakontas superstiĉojn. Li serioze priskribas la povon de Dio kaj ĉi tiu estas la sama Mormon al kiun Dio ordonis meti la "malgrandajn platojn" en la kroniko por "saĝa celo" (Vortoj de Mormon 1:7), kaj al kiun Dio ordonis ne aldoni aliajn aĵojn. (Vidu 3 Nifai 26:11).

La maniero per kiu la Libro de Mormon iris al la lumo eliminis la eblecon pritrakti ĝin kiel kolekton de legendoj transdonitaj de primitive popolo. Ĝi ne estis malkovrita de arkeologoj kaj tradukita de lingvistoj. Ĝi eliris per la povo de Dio, per la ileco de profetoj, anĝeloj, mirakloj kaj diaj iloj. Ĝi estis desegnata kaj konservata tra la aĝoj de Dio. Kaj kiam oni ĝin fintradukis, la voĉon de la Savanto aŭdis atestantoj. Tiu voĉo diris, ke la libro estas vera kaj la traduko estas korekta. Ĝian ateston pri la Malnovan Testamento oni devas konsideri serioze.

Aŭtoreco de la Libro de Moseo kaj Jesaja

Iuj kritikuloj pridubas la aŭtorecon de la libro de Moseo datumante ilin multe post la tempo, kiam vivis Moseo. Denove la Libro de Mormon validigas la tradician komprenon, ke Moseo estas la aŭtoro. Laŭ la skriboj de Nifai, la latunaj platoj - la "kroniko de la Judoj" kaj "geneologio de miaj prapatroj" (1 Nifai 3:3) - enhavas "la kvin librojn de Moseo, kiuj kronikas la kreon de la mondo, kaj ankaŭ rakontas pri Adam kaj Eva, kiuj estis niaj unuaj gepatroj." (1 Nifai 5:11). Ĉar ĉi tiuj libroj troviĝis inter la sanktaj libroj, kiujn familio posedis en la jaro 600 a.K., ili sendube estis verkitaj antaŭ tiu dato.

Kritikuloj ankaŭ pridemandas tion, ke Jesaja estas la aŭtoro de la libro, kiu alportas lian nomon. Unu el la supozoj de ili estas, ke "profeto" ne kapablas "antaŭvidi" la estontecon. Tiele, ĉar Jesaja nomis Ciron la estonta liveranto de la Judoj el sklaveco (Jesaja 44:28; 45:1), kritikuloj supozas, ke iu posteulo, iu "deŭtero" aŭ dua Jesaja - iu, kiu vivis post Ciro - devus verki ĉi tiun parton de la libro de Jesaja, ĉirkaŭ 540 a.K.

Por iuj bibliostudentoj, ĉi tio pridubigas la unuecon de la Biblio kaj ĝian valoron kiel inspirita aŭtoritato. Se tiuj, kiuj kredas la Libron de Mormon, scias, ke profetoj kapablas profeti. La nomo de Kristo konatiĝis jarcentoj antaŭ lia naskiĝo. (Vidu 2 Nifai 10:3). Ankaŭ la nomo de lia patrino Maria (Vidu Mosajja 3:8). Jozefo Smith konatiĝis laŭnome 3,500 jaroj antaŭ ol li naskiĝis (Vidu 2 Nifai 3:12). Se oni komprenas la rolon de profeto, ne malfacilas kredi, ke profeto povis identigi Ciron laŭnome ducent jarojn antaŭ ol li naskiĝis.

La ekzemplero de la Nifaiida libro alvenis Amerikon en 600 a.K., pluraj jardekoj antaŭ ol tiu supozita dua Jesaja vivis kaj verkis. Kaj ĝi inkluzivas citaĵojn el la ĉapitroj de la "unua Jesaja" (1-39) kaj el la ĉapitroj de la "dua Jesaja (40-66), atestante, ke Jesaja ilin ĉiun verkis. Profetoj de la Libro de Mormon kaj la leviĝinta Savanto Jesuo Kristo aludas al la profeto Jesaja multfoje - kiel homo, kiu verkis (Vidu 1 Nifai 15:20), kiu prijuĝis (2 Nifai 25:61), kiu vidis la antaŭteran Mesion (2 Nifai 11:2), kaj kiu atestis pri estontaj eventoj.

Estas multaj aliaj ekzemploj de klarigoj de la Libro de Mormon pri la Malnova Testamento. Multe da ili troviĝas en la futnotoj de la versio de la Biblio laŭ la Reĝo Jakobo.

La Libro de Mormon - alia atesto pri Jesuo Kristo - estas grava atesto pri la Malnova Testamento.